

El la Patra kor' naskita

CORDE NATUS EX PARENTIS

1. El la Pa-tra kor' nas-ki-ta
latine: Cor-de na-tus ex Pa-ren-tis

an - taŭ mon - do, an - taŭ temp',
an - te mund(i) ex - or - di - um

Li, la Al - fo kaj O - me - go,
Alph(a) et O - me - ga vo - ca - tus,

Li, la fon - to kaj la fin'
ip - se fons et clau - su - la

de l' es - tan - ta, de l' es - tin - ta,
om - ni - um quæ sunt, fu - e - runt

de l' es - ton - ta, post fu - tur':
quæ - que post fu - tu - ra sunt.

A - men.

2. Li sin per kadukaj membroj
vestis, per mortonta korp',
por nin savi de l' heredo
pereiga de Adam',
de l' detrua leĝ' de morto,
de l' profundo de Tartar'.

*Corporis formam caduci,
membra morti obnoxia
induit, ne gens periret
primoplasti ex germine,
merserat quam lex profundo
noxialis tartaro.*

3. Ho beata, kiu venis
el la sin' de l' Virgulin'!
Ŝi, graveda de l' Spirito,
portis bebon, naskis Lin.
Kaj la knabo sin elmontris
redemptor' de l' tuta mond'.

*O beatus ortus ille,
Virgo cum puerpera
edidit nostram salutem
feta Sancto Spiritu,
et puer redemptor orbis
os sacratum protulit.*

4. Viziuloj antaŭsente
en pratemp' prikantis Lin.
Lin la paĝoj de l' profetoj
antaŭdiris kun fidel'.
Jen la Promesit' ekfulmas.
Kune ĉio laŭdu Lin.

*Ecce, quem vates vetustis
concinebant sæculis,
quem prophetarum fideles
paginæ spoponderant,
emicat promissus olim:
cuncta collaudent eum!*

5. Gloron per bel-sonaj voĉoj
al la Patro donu ni.
Laŭdon ni al Kristo kantu,
kiun naskis Virgulin'.
Levu gloro sin eterna
al la fama Paraklet'. Amen.

*Gloriam Patri melodis
personemus vocibus;
gloriam Christo canamus,
matre nato virgine,
inclitoque sempiternam
gloriam Paraclito. Amen.*